



TEA-BULTENO

12^A JARO

JULIO - AŬGUSTO 2008

NUMEROJ 7-8

Hegel pravis, asertante ke el historio ni lernas nur, ke la homo nenion ajn lernas el historio.

George Bernard Shaw

61^a IFEF-KONGRESO 23-29/5/09 en Triesto, Italio

Post multaj jaroj, jen denove IFEF kongresis en Italio, ĉi-foje en Triesto, en la plej nordorienta parto de la lando. Tiu ĉi festis la 5^{an} kongreson okazintan en Italio: 1954 - *Verona*; 1970 - *Rimini*; 1978 - *Roma*; 1993 - *Cervia*.

Dum la ĉijara aranĝo oni celebris la centjariĝon de la Fervojista Federacio mem per kongreso riĉa je programeroj kiuj okupis konstante la partoprenintojn, per bunte eksterordinara inaŭguro, aperigo de du turismaj broŝuroj en esperanto (LA KASTELO DE MIRAMARE kaj KVAR KASTELOJ) kaj de aparte riĉa kongresa kajero 78-paĝa.

Partoprenis pli ol 200 personoj el 19 landoj, inter alie el Ĉinio, kiuj diligente sekvis la fakajn prelegojn, vizitis la urbon kaj ĉirkaŭaĵojn, atente kaj gaje ĉeestis la teatrajn prezentojn.

Kion raporti pri la fakaj prelegoj? Ili estis abundaj, tre interesaj, preskaŭ profesie prezentitaj, ni menci la plej gravajn: 100 jariĝo de *Tauern*-fervojo; Historio de Itala Fervojo; Evoluo de la granda rapido en Italio; Art-pentritaj stacidomoj; La fervojo *Gdansk-Constanta*; Nova tram-fervojo en *Aarhus*; Veturigiloj por pasaĝertransporto de personoj kun limigita moviĝebleco kaj orientiĝo en Ĉeĥa Respubliko; Diagnostiko en fervojaj sekuriginstalaĵoj; Tabeloj pri financa negocado de kroataj fervojaj kompanioj. Espereble mi ne forgesis ion...

Terminologia komisiono pridistudis specifajn temojn, necesajn kaj utilajn por pliriĉigo de la faka terminaro. La IFEF-Estraro decidis, inter alie, pri la venontaj kongresoj: 2010 en Bulgario - Sofio kaj 2011 en Ĉeĥio - Liberec.

Elstaris prelego pri "Violonfarada arto" de la italo *Gianni Orsini*, kiu ne nur amas violonojn, sed ankaŭ konstruas ilin kaj menciindas perbilda prezento de la urbo Triesto.

Oni povis ĝui plurajn teatrajn prezentojn: Saša Pilipović distris la publikon per UNIVERSALA KABAREDO, François Stride gitare kaj Margerita akordeone ludis klasikan muzikon, Giuliano Turone monologis PRI LA MALUTILO DE LA TABAKO; sekvis la Regiona Vespero, dum kiu rolis la

Virinvoĉa koruso I. GRBEC de *Servola/Triesto* kaj la Tradici-kostuma Grupo BISIACHI de urbeto *Turriaco*, kiuj kantis ankaŭ en esperanto. Krome okazis klasik-muzika vespero danke al Egle Jarkova el Litovio - violono, kaj Sergio Escalera el Bolivio - fortepiano, kaj, ĉe la kongresa fermo, la Koruso URBO TRIESTO prezentis kantojn itale kaj esperante, inter alie la Himnon, kiu belege signis la finon kaj transdonon de la kongresa flago al s.ino Kamburova el Bulgario.

Pluraj ekskursoj, ankaŭ post-kongresaj, permesis pli bonan konatiĝon kun la triesta teritorio kaj eĉ tiu regiona.

Finraporte, kelkajn vortojn pri la inaŭguro: la gastoj estis akceptitaj de virinoj en lokaj kaj aŭstra kostumoj disdonantaj artefaritan ornaman floran, partoprenis reprezentantoj de la Komunuma kaj Provinca Administracioj, kiuj bele rilatis al nia movado, pluraj kongresanoj vestis sian fervojan uniformon, la delegitoj salutis plejparte kunportante tre aprezatajn donacojn, kaj por kroni la tuton, loka asocio nomita "La 13 nobelaj triestaj familioj" (familioj kiuj regis la urbon antaŭ multaj jarcentoj) prezentis bonvenigan ceremonion en mezepokaj kostumoj kaj kun mezepokaj kantoj, doninte al la ĉeestintoj panon kun salo kaj glason da vino kiel signojn de bonakcepto. Superfluas diri ke la kongresanoj entuziasme fotis, fotis kaj fotis.

Krome: porokaza filatela stampo kun specialaj kovertoj vekis grandan intereson kiuj estas ankoraŭ haveblaj.

Entute tre sukcesa aranĝo!

Aldona noto: dum esperanto-aranĝo oni supozas ke la partoprenantoj scipovas la internacian lingvon esperanton, ĉu ne? Alimaniere, kial aliĝi? Do... bone, ankaŭ ĉi foje pluraj personoj ne kapablis diri eĉ vorteton, kio minimume implicas miskomprenojn kaj disdividojn inter la kongresanoj. Tio ne estas en la spirito de nia esperanta kunestado.

Nur makulo sur ĝi: la konduto de kelkaj rumanaj partoprenintoj, kiuj vere kaj serioze damaĝis la lokajn organizintojn. Estas ege bedaŭrinde ke pro malbona konduto de iuj, la kulpo surfalu la ceterajn. Al venontaj organizantoj ni rekomendas atentan akcepton de aliĝoj.

Edvige Ackermann



Filatelaĵo

London, la 25^{an} de majo, en la halo de la kongresejo, *Stazione Marittima*, funkciis, ekde la 10^a ĝis la 14^a horo, poŝta giĉeto: ĉiuj korespond-aĵoj ricevis la porokazan stampon, surhavantan la kongresan simbolon. Estis stampitaj ĉirkaŭ mil kartoj/kovertoj: laŭdire de la poŝtaj oficistinoj, rekorda nombro! Je dispono de la filatelistoj/korespondemuloj, du diversaj kartoj desegnitaj de Eraldo Sepulcri. Por informoj/mendoj skribu al Triesta Esperanto-Asocio, rete aŭ poŝte, eĉ telefone (vd. kolofonon, je paĝo 6^a de ĉi Bulteno), aŭ al Elda Doerfler, testudo.ts@gmail.com.



Postkongresaj mesaĝoj

Antaŭ kelke da tagoj mi ricevis rete la revuon *INTERNACIA FERVOJISTO*. Tre bone redaktita de s-ro Jean Ripoché, ĝi estas informrica kaj interesa ne nur por fervojistoj. La titolo de la artikolo dediĉita al la ĵus finita aranĝo jenas: "Sukcese okazis nia centa IFEF-datreveno en Triesto". Nu, kun fiero (ho, kia peko!) mi legis kaj relegis ĝin: ĉu veras? Kial dubi, tamen? Tial, sekve de tiuj kuraĝigaj vortoj, kun plezuro mi aperigas, mallongigitajn, kelkajn komentojn/laŭdojn/gratulojn. Mi ĵuras al vi, ke ĝis nun neniu malaproba mesaĝo/letero atingis nin. Se eventuale tio estos, mi promesas aperigi tiujn venontbultene!

El Ĉeĥio, Magdaléna Feifířová: Mi volas danki vin kaj viajn kunhelpantojn pro la agrabla kongreso, kiun vi organizis! Por ĉiam restos en mia memoro precipe la impona marŝado de 13 nobelaj familioj, kiuj "gardis" nin dum la kongreso... eĉ via ventego "bora", kiun ni parte travivis! Kaj la bonega itala glaciaĵo... kaj Triesto mem... la maro, la placoj, la ponto kun seruroj. Mi mem tre ŝatas popolajn prezentaĵojn kaj kantojn, do ankaŭ tiun de viaj ensembloj mi ĝuis. Kaj ne en la lasta vico mi rememoros la ĝuon kaj ardon kun kiu vi plenumis viajn kongresajn taskojn...

El Danio, E. Henning Olsen: Elkorajn dankojn pro la bonsukcesa, interesa kaj varma kongreso en la ĉarma urbo Triesto. Multaj belaj memoraĵoj estas en niaj kapoj kaj ni vere admiras vin pro via granda laboro.

El Francio, Jean Ripoché: Je mia nomo mi deziras gratuli vin, vian prezidanton Edvige kaj la tutan triestan skipon, kiuj faris tiele ke ĉiu el ni sentis sin kiel hejme en via agrabla urbo. Dankegojn al vi ĉiuj. Tiu kongreso agrable disvolviĝis, eĉ se kelkafoje iu sablero iom rajpis la maŝinon (*ndr: mi lernis, danke al li, la teknikan vorton "rajpi".*) Sed en kiu kongreso ne estas iom da malagrablaĵo? La akcepto, la hoteloj, la kongresejo, la turisma kaj plezura programo, la vigleco de ĉiuj viaj helpantoj plaĉis al ĉiuj partoprenintoj. Dank' al vi, ambaŭ ni trapasis agrablan restadon kaj nia kongreso fariĝis sukcesa...

El Germanio, Heinz Hoffmann: Mi denove volas elkore danki al vi pro viaj klopodegoj por sukcesplena kongreso. Al ni tre plaĉis la tuta restado.

El Hispanio, Rafael Peris Solaz: Mi gratulas al vi kaj la tuta LKK pro la bona organizado de la IFEF-Kongreso, tie en Triesto. Estis bela kongreso, speciale por ni filatelistoj, pro la poŝta stampo kiu estis tre sukcesa.

El Hungario, Istvan Sutka: En la nomo de kelebiaj esperantistoj, ni dankas pro ĉio. Ni estis tre kontenta pri ekskursoj, programoj kaj loĝejo. Vi estis/as perfektaj organizantoj.

El Slovenio, Jovan Mirković: En propra nomo kaj en nomo de aliaj slovenaj kongresanoj, mi korege dankas al vi kaj al tuta LKK-teamo, por bone preparita kaj funkcia kongreso. Mi miras, ke vi, por la kongresa kotizo, ofertis tiom da presita materialo kaj tiel varia kultura programo. Ĝuste tie videblas via plena engaĝiĝo kaj sindona laboro. Estimate mi salutas vin kaj deziras sukcesan laboron estonte!

Koran dankon al ĉiuj gratulintoj pro ilia skriba atesto, kio rekompencas nin pro la streĉa engaĝiĝo kaj klopodado, igi ĉi tiun jubilean kongreson neforgesebla!



Mallonge pri ...

Nova Koresponda Servo - kun fotoj!

Ekfunkciis nova internacia esperantista koresponda servo kun la nomo KORESPONDA SERVO UNIVERSALA, KSU. La Servon iniciatis Viktor Kudrjavcev, redaktoro de la revuo KOMENCANTO. La servo facilas por uzo kaj preskaŭ ĉiuj korespondanonoj kunhavas fotojn!

Adreso de la servo:

<http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/>

Krom plumamikaj, KSU akceptas ankaŭ alispecajn anoncojn kaj informojn!

Por scii plie, vizitu la ttt-ejon <http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/esperantoplus@mail.ru>

UEA lanĉis novajn servojn en Interreto. Meze de majo aperis la unua numero de "**UEA viva**", 10-minuta filmĵurnalo kun raportetoj pri aktualaĵoj en UEA, TEJO kaj la Centra Oficejo, pri novaj libroj, ktp. Jam aperis du numeroj.

Iom pli frue ekfunkciis reta kinejo, kie eblas jam spekti programojn de la aprila Malferma Tago de la CO kaj historiajn dokumentojn pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom oni aldonos aliajn filmojn. "UEA viva", troviĝas en

<http://www.youtube.com/UEAviva>

La reta kinejo troviĝas en

<http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

La aperitmo de numeroj de "UEA viva" kaj de novaj filmoj en la reta kinejo dependos de ilia populareco. Mi invitas vin regule rigardi ilin kaj diskonigi ilin! Oni povas finance subteni la produktadon de tiuj novaj servoj per donaco al la konto "video" ĉe UEA. Koran dankon!

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA

www.presseurop.eu/it

Kio estas tio?

Ĝi estas URL. Ĉu kodo aŭ akronimo de maldeca fivorto? Ne! Ĝi estas nur la retadreso de novnaskita ĵurnalo *on-line* (kiom pli bele pleniĝas buŝo per "on-line" ol per la ege modesta, ... sed eble pli komprenebla, "reta"!).

«**Presseurop.eu** – skribas Giovanni De Mauro, direktoro de *Internazionale*, per prezento en n-ro 797 – estas iniciatita kaj financita de Eŭropa Unio. Por ĝin efektivigi – en la plej absoluta eldona aŭtonomio – asociiĝis kvar ĵurnaloj: la itala *Internazionale*, la franca *Courrier International*, la portugala *Courrier International* kaj la pola *Forum*. Ĝi estos deklingva diĝita tagĵurnalo. Por rakonti pri kio niaj najbaroj parolas. Kaj klopodonta pruvi, ke Eŭropo estas malpli enuiga ol ĝi ŝajnas.»

Giovanni De Mauro, filo de Tullio De Mauro (iama itala Ministro pri Instruado, esperantisto) fondis kaj direktas la semajnan revuon *Internazionale*, kiu publikigas, itallingve tradukitajn, artikolojn el la ĉefaj ĵurnaloj kaj revuoj el la tuta mondo.

Presseurop.eu celas – kunlabore kun aliaj ĉefroluloj pri informado en Eŭropo – kontribui al starigo de eŭropa transnacia publika areo.

Pere de *Euranet* (reto de eŭropaj radioelsendoj kiun ankaŭ iniciatis Eŭropa Komisiono), *Euronews* (internacia informo-ĉeno, gvidanto en Eŭropo) kaj *Press-europ*, naskiĝas la unua eŭropa reto, kiun starigas informiloj havantaj komunan celaron.

Presseurop.eu bone premisas, ĉar la partneroj reprezentas familion da ĵurnaloj tute seriozaj kaj respektindaj.

Trafoliumante libron de historiaj rememoroj

Triesto kaŝita

La tri mueliloj

Sub la strato *Carducci*, kuras torento kiu antaŭ pli ol unu jarcento fluis surtere. Tiu rivero, ĉe la kruciĝo kun strato *Milano*, dividiĝis en du branĉojn. Ĉe la flanko de tiu kiu laŭiris straton *Milano*, ĉirkaŭ la jaro 1830, funkciadis tri mueliloj. Tiam tiu teritorio estis kampara, sed iom post iom oni komencis konstrui domojn kaj stratojn kaj la riveroj estis subterigitaj. Kompreneble la tuta areo transformiĝis. Nura restaĵo de ekzisto de tiuj muelejoj evidentiĝas en tri ŝtonaj ŝtupoj, fine de strato *Milano*, direkte al strato *Carducci*: tiu estas la lasta spuro de akva kanalo, en kiu turnis la aloj de la antikvaj muelejoj.

La "Arlekena" Palaco

Rezidejo de la triesta nobelfamilio Leo, apartenanta al Kunfrataro "13 Familioj", estis la palaco, kiu troviĝas en la malnova parto de la urbo, en kvartalo "Cavana" kaj kie nun sidejas la Muzeo pri Orienta Arto. Tiu palaco ankoraŭ nun povus rakonti multajn interesajn anekdotojn okazintajn en tre foraj tempoj.

Inter la jaroj 1772 kaj 1773, tiu palaceto estis regule vizitata de Jakobo *Casanova*, kiu en tiu periodo vivis en Triesto post longa kaj aventura restado en Pollando. La 47-jara kavaliro estis tuj bonvene akceptita en la plej elitaj urbaj salonoj.

En la palaco *Leo* festoj kaj pompaj dancvesperoj estis ofte organizitaj, kaj en unu el tiuj okazoj Jakobo havis la ŝancon renkonti du personojn kiujn li rememoros dum sia tuta posta vivo. Dum masko-festeno li ekkonis du ge-Arlekenojn, kaj pro la karaktero gaja kaj mokema de la tri personoj, ekestis aŭtentika duelo el ... vortoj kaj ŝercoj. Spritaĵoj, vortludoj kaj pajacaĵoj eksplodadis aere, preskaŭ senfinaj. Precipe malrespektema montriĝis Arlekeno, dum *Casanova*, ĝuste por teni ĉiam alta sian renomon de fama amanto, direktadis sian mokeman atenton al ... Arleken-in-o. Je la vesperfino, ... for la maskojn! Kaj jen la surprizo, kiam malkovriĝis ke tiu Arlekeno estis Heleno, la filino de la dommastro, dum Arleken-in-o estis ŝia frato.


Priridita estis *Casanova*, sed tio entute ne gravis por li. Inter Jakobo kaj la belega Heleno *Leo* naskiĝis intensa amo, kiu longatempe daŭris. En siaj "Rememoroj" (*Memoires*) li memoras tiun epizodon kun iom da bedaŭro kaj multa tenereco: ekde tiam, je ĉiu sia reveno al Triesto, li ĉiam vizitis sian belan "Arlekeninon", kun kiu, dum multegaj jaroj, li am(ik)e korespondis.

Krome ne temu pri provbalono, starigita pro kaj por la eŭropaj balotadoj. Kiel ajn, vizitu <http://www.presseurop.eu/it>: tute valoras!

Faru ankaŭ kuran viziteton al la familia **Cafébabel.com**, hodiaŭ unu el la ĉefroluloj en la eŭropa debato.

Demando: **Presseurop.eu** disretiĝas en dek lingvoj: ĉu ankaŭ dekunua helpus?

VIGLO



Internacia Konkurso pri Poezio "Kastelo de Duino 2010"

Poezio kaj Solidareco Lingvo por la Popoloj

- ⇒ Dediĉita al junularo ĝis 30 jaroj
- ⇒ Senpaga partopreno
- ⇒ Temo : **"Lumoj / ombroj"**

La temon oni komprenu en plej ĝenerala signifo, kies gvidlinio povus esti: la natura ciklo de la tempo, la koloroj de l' realo kaj l' animo, metaforoj de vivo, elpensado, dubo, ...

La poeziaĵoj estas akceptitaj en la gepatra lingvo de la aŭtoroj aŭ/kaj en la internacia lingvo esperanto. Oni petas tradukon ĉu en la italan, ĉu en la anglan, ĉu en la esperantan lingvojn. Ĵurio konsistanta el poetoj kaj beletraj kritikistoj, plurlingve kapablaj, taksos ilin ankaŭ en la originala lingvo.

Ĉiuj konkursanto rajtas partopreni nur per unu poeziaĵo kun maksimume 50 versaĵoj.

Premioj: tri premioj je 500 € por ĉiu el la unuaj tri klasifikitaj (parton de la premio oni asignos al iu solidareca kaj humanisma institucio); antaŭviditaj ankaŭ malpli valoraj premioj kaj specialaj mencioj.

La poeziaĵoj de la premiitoj kaj aro el la plej bonaj poeziaĵoj estos eldonitaj ĉe IBISKOS Eldonejo *Risolo*, sponsoro de la konkurso (gajno iros favore al Fondaĵo Luchetta-Ota-D'Angelo-Hrovatin por la infanaj viktimoj de milito) kaj surbendigitaj en la originala lingvo en KD.

Honora mencio al la plej bonaj verkoj de gejunuloj kun aĝo malpli ol 16-jara.

Honoraj mencioj por la tri plej bonaj lernejoj kiu partoprenos per kolektiva verko.

Ĉiuj konkursantoj povas peti aperigon senpagan de sia poeziaĵo en la konkursa TTT-paĝo:

www.castellodiduinoepoesia.it

La poeziaĵoj estu senditaj ĝis la 31^a de decembro 2009, dum por la lernejaj laboraĵoj la limdato estas la 15^a de januaro 2010 per e-poŝto al: valera@units.it.

A) La mesaĝo devas enteni la aliĝilon (vidu suben), kaj la poeziaĵon oni sendu per "word" aŭ "rtf" (ne akceptataj aliaj formatoj) kiel aldonitaĵo.

B) per ordinara poŝto al: Gabriella Valera, Via Matteotti 21, 34138 Trieste, Italia

La letero devas enteni la aliĝilon plenigitan. Pri sendo-dato atestos la poŝta stampo, sed neniu verko estos akceptita post la eklaboro de la ĵurio.

ALIĜILO

NOMO	FAMILIA NOMO		naskiĝdato
strato		numero	poŝta kodo
urbo	provinco		telefono
retadreso			nacieco
titolo de la verko			

Deklaro: Mi atestas ke la poeziaĵo ..., (titolo) per kiu mi partoprenas la internacian konkurson "Kastelo de Duino", estas mia originala verko, neaperinta ĝis nun kaj neniam premiita. Mi konsentas ĝian eblan eldonon aŭ prezentadon publike. Mi deklaras krome esti / ne esti (forstrekita la nevalidan) registrata ĉe SIAE - Asocio Internacia Aŭtoroj kaj Eldonistoj, aŭ ĉe alia simila asocio pri protekto de aŭtoraj rajtoj.

Atentu! Atentu! Atentu!

Nepre ne maltrafu la somerferman renkontiĝon, dum kiu - ho, ve! Ne ploru jam nun! - ni salutos François Stride, kiu - fininte sian specialiĝperiodon en Triesto - reiros hejmen. La adiaŭa aŭ, pli bone, la ĝisrevida festo okazos en Rifuĝejo *Premuda (Bagnoli della Rosandra)* ekde la 19^a horo, vendredon la 10^{an} de julio. Bonvolu informi nin pri via intenco ĉeesti, ĉar oni devas rezervi la lokojn. Kontakteblaj numeroj: Elda 040 398562; 339 2226936; Edvige: 040350093; TEA-sidejo, marde k. vendrede vespere: 366 1720440.



Fermo de la asocia sidejo: ekde la 10^a de julio ĝis la 3^a de septembro!
Ĝis la revido je la 4^a de septembro 2009! Bonan somerumadon al ĉiuj!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos ekde vendredo la 4^a de septembro: kune ni programos la estontajn farendaĵojn. Unue, propaganda agado pri kursoj; due, preparlaboroj cele la organizadon de Ekspozicio kun titolo "Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Lazaro Ludoviko Zamenhof", kiu jam ricevis la subtenon de Triesta Komunumo. Per paneloj kaj bildkartoj ni prezentos la historion de la iniciatinto de Esperanto en la Salono Fittke (eksa *Albo Pretorio*, malantaŭ la urbodomo). Por tion aranĝi en inda maniero, nepras ankaŭ via helpo kaj kunlaboro.

Fine, ne forgesu aŭskulti novaĵojn pri Esperanto, kadre de la alirprogramoj de Radio UNO, en la jenaj tagoj: la 20^a de julio kaj 20^a de aŭgusto, je la 14a horo.

Foje, kiam mi devas ekuzi, skribe aŭ parole, la nomon de iu lando, ekas kapdoloro, kaj, daŭre, pro ia sento de malcerteco, mi serĉadas en PIV la seneraran terminon. Problemoj kompreneble ne estas ĉe ĉiuj landnomoj (bonŝance!) sed pri kelkaj jes.

Ekzemple, pri Meksiko/Meksikio. Eĉ post legado de la plej ekzemplodonaj libroj aŭ revuoj, ne eblas trankviliĝi pri propra elekto. Jen tie legeblas Meksiko, jen tie Meksikio. Kaj kion diras la nova PIV? Ja legu je paĝo 723^a! En

la 1980^aj jaroj (mi ne memoras precize pri la dato) aperis en MONATO la listo aprobita de la Akademio, jam delonge prilaboranta ĝin. Tiun liston mi enmetis unuapaĝe de mia Plena Ilustrita Vortaro, por rapida konsultado kaze de bezono. Iom poste estis eldonita la bonega revuo "La Letero de l' Akademio" (ekde 1987) kie troveblis interesegaj, klaraj, kleraj kaj klerigaj priskriboj de diversaj diskutendaj prigramatikaj kaj prilandnomaj problemoj: ja ŝajnis ke finfine tiu kaosa kaj kontraŭdira regularo ricevis sian definitivan solvon.

Tamen ekzistis ankoraŭ io alia, kio kontribuis eble iom konfuzigi la esperant-lingvanojn, nome pri la uzado de la sufikso -uj- aŭ -i-. Pri ĉio ĉi legeblas en la Aktoj de la Akademio (1975-1991). La argumentado de la diversaj proaj kaj malproaj subtenantoj de unu aŭ la alia sufikso ne tiom utilis por konvinkiĝi – almenaŭ miakaze – pri praveco de unu aŭ la alia. Konstante mi balancas inter unu elekto kaj la alia, dume pli kaj pli da duboj kaptas min: ĉu tiu -i- estas aŭ ne autentika sufikso? Se tia ĝi estus, oni povus ĝin apliki al kiu ajn radiko, se la kunmetado havus ian signifon aŭ ekzistokialon.

Sed ja mi ne estas akademiano, jam bolegas mia cerbo, kaj, antaŭ ol forvaporiĝu la lastaj ankoraŭ funkciantaj ĉeloj, mi preferas – kaze de bezono – tutsimple konsulti la "Liston de rekomendataj landnomoj", ĵus aperintan en la Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, kiun mi volonte publikigas en TEA-Bulteno, esperante ke ankaŭ vi, kiel mi, trovos ĝin treege utila, nemalhavebla helpilo por paroli kaj skribi kiel eble plej korekte kaj klare nian belan lingvon Esperanto.

Listo de Rekomendataj Landnomoj

La 15an de Marto 2009 la Akademio de Esperanto finis du voĉdonadojn. Unu temis pri *Listo de Rekomendataj Landnomoj* ellaborita de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. La alia temis pri du ŝanĝoj en la statuto de la Akademio.

... ..

La nova *Listo de Rekomendataj Landnomoj* estas ĝisdatigo kaj revizio de decido el 1989. Ĝi entenas nomojn de ĉiuj nunaj landoj, kiuj estas membroj de UN, kaj ankoraŭ la nomojn de kelkaj pliaj landoj (inkluzive de tri landoj, kiuj malaperis aŭ disiĝis post 1989). Jen mallongigita prezento de la rekomendataj nomoj:

Afganujo/Afganio; Albanujo/Albanio; Alĝerio; Andoro; Anglujo/Anglio; Angolo; Antigvo kaj Barbudo; Argentino; Armenujo/Armenio; Aŭstralio; Aŭstrujo/Aŭstrio; Azerbajĝano; Bahamoj; Bangladeŝo; Barato (= Hindujo/Hindio); Barbado; Barejno; Belgujo/Belgio; Belizo; Belorusujo/Belorusio; Benino; Birmo; Bocvano; Bolivio; Bosnujo/Bosnio kaj Hercegovino; Brazilo; Britujo/Britio; Brunejo; Bulgardo; Bulgario; Burkino; Burundo; Butano; Centr-Afriko; Ĉado; Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio; Ĉeĥujo/Ĉeĥio; Ĉilio; Ĉinujo/Ĉinio; Danujo/Danio; Dominika Respubliko; Dominiko; Ebur-Bordo; Egiptujo/Egiptio; Ekvadoro; Ekvatora Gvineo; Eritreo; Estonujo/Estonio; Etiopujo/Etiopio; Fiĝio; Filipinoj; Finnlando; Francujo/Francio; Gabono; Gambio; Ganao; Germanujo/Germanio; Grekujo/Grekio; Grenado; Gronlando; Gujano; Gvatemalo; Gvineo; Gvineo-Bisaŭo; Ĝibutio; Haitio; Hindujo/Hindio (= Barato); Hispanujo/Hispanio; Honduro; Hungarujo/Hungario; Indonezio; Irako; Irano; Irlando; Islando; Israelo; Italujo/Italio; Jamajko; Japanujo/Japanio; Jemeno; Jordanio; Jugoslavujo/Jugoslavo; Kaboverdo; Kamboĝo; Kameruno; Kanado; Kartvelujo/Kartvelio; Kataro; Kazahujo/Kazahio; Kenjo; Kipro; Kirgizujo/Kirgizio; Kiribato; Kolombio; Komoroj; Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa); Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila); Kosovo; Kostariko; Kroatujo/Kroatio; Kubo; Kuvajto; Laoso; Latvujo/Latvio; Lesoto; Libano; Liberio; Libio; Liĥtenŝtejnoj; Litovujo/Litovio; Luksemburgo; Madagaskaro; Makedonujo/Makedonio; Malajzio; Malavio; Maldivoj; Malio; Malto; Maroko; Marŝaloj; Maŭritanio; Meksiko; Mikronezio; Moldavujo/Moldavio; Monako; Mongolujo/Mongolio; Montenegro; Mozambiko; Namibio; Nauro; Nederlando; Nepalo; Niĝerio; Niĝero; Nikaragvo; Nord-Koreujo/Nord-Koreio; Norvegujo/Norvegio; Nov-Zelando; Omano; Orienta Timoro; Pakistano; Palaŭo; Panamo; Papuo-Nov-Gvineo; Paragvajo; Peruo; Pollando; Portugalujo/Portugalia; Ruando; Rumanujo/Rumanio; Rusujo/Rusio; Salomonoj; Salvadoro; Samoo; Sankta Kristoforo kaj Neviso; Sankta Lucio; Sankta Vincento kaj Grenadinoj; Sanmarino; Santomeo kaj Principeo; Sauda Arabujo/Sauda Arabio; Sejŝeloj; Senegalo; Serbujo/Serbio; Siberio; Sieraleono; Singapuro; Sirio; Skotlando; Slovakujo/Slovakio; Slovenujo/Slovenio; Somalujo/Somalia; Sovetio, Sovet-Unio; Srilanko; Sud-Afriko; Sud-Koreujo/Sud-Koreio; Sudano; Surinamo; Svazilando; Svedujo/Svedio; Svislando; Taĝikujo/Taĝikio; Tajlando; Tajvano; Tanzanio; Togolando; Tongo; Trinidado kaj Tobago; Tunizio; Turkmenujo/Turkmenio; Turkujo/Turkio; Tuvalo; Ugando; Ukrainujo/Ukrainio; Unuiĝintaj Arabaj Emir-landoj; Urugvajo; Usono; Uzbekujo/Uzbekio; Vanuatuo; Vatikano; Venezuelo; Vjetnamujo/Vjetnamio; Zambio; Zimbabvo.

La novan version de la statuto kaj la plenan dokumenton pri landnomoj la Akademio baldaŭ publikigos en sia TTT-ejo ĉe <http://akademio-de-esperanto.org>.



Pensiulo, post gaja diboĉvespero pasigita en drinkejo kun amikoj, fine decidas reiri hejmen. Jam la tria horo nokte estas, kaj li... "plena kiel ovo"! Kun ega malrapido li sukcesas enaŭtomobiliĝi, startas motoron kaj direktiĝas al sia hejmo. Sed tumulte kirlas en lia kapo la jena penso: "... malrapide, malrapidete, mi veturos, ne tiomas la distanco. Ĉu ili haltigos ĝuste min? Ho, ho, se policano min kaptas, eĉ mian stirrajtigilon oni forprenos de mi. Poste, kion mi faros?"

Kaj jen, eĉ ne post unu kilometro, kiel en la plej nigre nigraj koŝmaroj, jen li, la policano, kiu firme staras sur la ŝoseo, agitante la signalplaton.

"Bonvolu, la stirrajtigilon mi petas!" diras la policano.

Timo- kaj vino-plena, la viro ion konfuze balbutetas, serĉas en la jaka poŝo la rajtigilon. Antaŭ ol ĝin transdoni al policano, li ekpensas bona la ideon enŝovi en ĝin 100-eŭran monbileton... La policano prenas la stirrajtigilon, ĝin malfermas, ekvidas la monbileton... iom oblikve lin rigardas, sed, fine, ŝajnigante nevidon, enpoŝigas la monon kaj diras: "Nu, nu, iru, sed - mi rekomendas - malrapide!"

La ebrulo foriras kaj enpense: "... danke al Dio, mem solviĝis la afero. Pli bone 100 eŭroj malpli ol sen stirrajtigilo." Sed, eĉ ne cent metrojn li veturis, ke - denove! - policano lin haltigas. "Fek! Ĉi tiu estas diabla strato." Ekpensas la kompatindulo.

La policano invitas lin, geste, mallevi la glacon. "Bonvolu, vian stirrajtigilon!" Jam teruro ekposedas lin, pripense la eventualajn sekvojn, ree li fuŝpareletas sence, kaj klopodas retrovi en siaj poŝoj tiun damnan stirpermesilon. Finfine, post pli ol du-tri minuta serĉado, kio ŝajnis senfindaŭra, jen la rajtigilo, sed antaŭ ol ĝin transdoni al policano, kiu jam kun evidenta senpacienco batetis ritme siajn fingrojn sur la aŭta tegmento, en ĝin li metas ... 50-eŭran monbileton.

La policano prenas la stirrajtigilon, ĝin malfermas, ekvidas la monon, rigardas la homon kaj, ŝajnigante nevidon, enpoŝigas la monon kaj, balancante iom la kapon: "Bone, iru, iru, kaj stiru prudente, mi petas."

La kondukisto foriras, duafoje, pensante: "... ja, ankaŭ ĉiŝoj ne estos seriozaj konsekvencoj. Pli bone malhavi 150 eŭrojn ol stirpermesilon. Mi ja baldaŭ estos hejme, espereble ĉio glate iros, ĉar ja mia monujo preskaŭ malplenas!" Sed jen, kvazaŭ spite, trian fojon antaŭ li staras policano. "Diable, ... fie al urbestro kaj la tuta komunmestraro, sed kion oni faras? Ĉu ne estus pli bone, ke tiom da policanoj okupiĝu pri aŭtentikaj krimuloj, anstataŭ min turmenti? Kaj kiam, tiu ĉi kak-strato finiĝos? Fi al ĉiuj!" pensas la povra ebrulo.

La policano alproksimiĝas al la aŭtomobilo, geste lin invitas mallevi la glacon. Inter unu blasfemo kaj la alia, li mallevas la glacon, kaj, rigardas, kun duonferma okulo, la policanon, kiu - seriozmiene - tiel sin turnas al la ŝoforo: "Avo mia, kiom da moneroj ankoraŭ vi havas en la poŝo?" La ebrulo, kiu jam eĉ ne plu kapablas resti sidanta rektapozicie, larĝigas la okulojn je tiu demando. Priserĉas akurate en la poŝoj, kaj ne nur en la poŝoj... Post esti kontrolinta eĉ la centimojn, li respondas: "Restas al mi ankoraŭ dudek kvin eŭroj..." "... Nu bone, maljunuleto mia, donu al mi ĉi lastajn eŭrojn, kaj poste mi montros al vi kiel eliri el tiu ĉi diable damna fi-rondvojkruĉiĝo!"

Poezia angulo

Nokta somero

La tempo preskaŭ perdiĝas
en ĉi longajn tagojn
de varma somero.
Kaj en la muta sinsekvo de silentaj horoj
dolĉe fariĝas sin luli
en anguloj de l' plaĉa vespero.
Kaj en l' eternaj melodioj de l' nokto,
tempo ne tempo por nostalgio,
reaperas naivaj pensoj perditaj.

Pier Giorgio Soranzo

Kvieta vespero

Jam glitis la tago,
sen grandaj aferoj,
okupita en la kutimaj
senpaŭze domaj laboroj.
Kaj, preskaŭ surprize,
jen la ruĝaj strekoj
de la falanta suno
kiuj disvolviĝis
en la hela ĉielo.

Malrapide amasiĝis
brunaj aeraj ombroj.
Silenta alvenas nokto
kiu, sen grandaj aferoj,
glitos al la nova tago.
Nura kompanio tiam
Al vi estos la lastaj rememoroj.

Santi Elena Bullo

Solvo de la kvizoj aperintaj en marta- aprila Bulteno

ANAGRAMO (3,6 = 9)
ene, pastro - esperanto
DUSENĜAJO (kvar-litera):
Hupo
VOKALŜANĜO:
verko - vorko



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Eida DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa tt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristiana
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349